ESPERANTA
BIBLIOTEKO INTERNACIA

Tradukis
Vicente Inglada.

No. 23.
Prezo 0,100 Sm.

Hispanaj Dramoj

de Jacinto Benavente.



BERLIN.
Esperanto Verlag Möller & Borel
kaj korespondantoj en
Washington, Kjöbenhavn, Warszawa, Barcelona,
Moskva, Genova, s'Gravenhage, Genève.

La libroj de la

Esperanta Biblioteko Internacia

estas riceveblaj en:

Berlin de Esperanto Verlag Möller & Borel, Lindenstrasse 18/19.
Paris de Hachette & Co., 79 Boulevard St. Germain.
London de British Esperanto Association, Museum Station Buildings, 133—6 High Holborn.
Washington D. C. de American Esperantist Company.
Kjöbenhavn de Andr.-Fred. Höst & Sön, Bredgade 35.
Warszawa de M. Arct, 53 Nowy Swiat.
Barcelona de Juan Rosals, Puerta Ferrisa 30.
Budapest de Lajos Kókai, Károly-utca 1.
Moskva de Moskva Librejo Esperanto, Tverskaja 28.
Genova de Dro A. Stromboli, Via Assarotti 54/15.
s'Gravenhage de Ĝenerala Librejo „Espero", Prinsestraat 48.
Genève de Universala Esperantia Librejo, 10 rue de la Bourse.

Ĉiu numero de la *Esperanta Biblioteko Internacia* kostas *unu spescenton* (0,100 Sm) = 25 centimoj, 20 pfenigoj, 2 1/2 pencoj, 5 cendoj, 24 heleroj, 10 kopekoj, 10 oeroj.

Serio de 12 numeroj (afrankite) 1,250 Sm.

1919

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

Tradukis
Vicente Inglada.

No. 23.
Prezo 0,100 Sm.

Hispanaj Dramoj

de Jacinto Benavente.

BERLIN.
Esperanto Verlag Möller & Borel
kaj korespondantoj en
Paris, London, Washington, Kjöbenhavn, Warszawa, Barcelona, Budapest, Moskva, Genova, s'Gravenhage, Genève.

546668

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 3319
FILIA Nr 14
w Białymstoku

821.134.2-2 (082.2)

Antaŭparolo.

Jacinto Benavente, filo de kuracisto, naskiĝis en Madrido la 12an de Aŭgusto de 1866. Depost sia frujuneco li sin dediĉis al la beletristiko. Liaj unuaj verkoj „Versoj“ kaj „Fantazia teatro“ (el kiu ni ĉerpis „La servanto de Don Juan“) altiris la publikan atenton kaj la apero de „Leteroj de virinoj“, kiujn oni juĝis „juvelojn de subtila virina psikologio“ donis al li grandan aŭtorfamon.

Lia unua teatraĵo „La nesia hejmo“ estis prezentita la 6an de Oktobro de 1894. Sekvis aliaj verkoj, akceptataj ĉiam kun kreskanta sukceso, kiuj igis lin la preferata aŭtoro de la hispana publiko.

En siaj kreaĵoj Benavente uzas propran stilon, amuzan prozon kaj tian interesecon, ke la agado eĉ unu momenton ne malvigliĝas. Lia frazaro estas sprita, la esprimoj trafaj, kiel sagoj. Kun tre solida kaj moderna kultureco, li per unu trajto plene priskribas personon, per unu lerta esprimo liŝparas longan samefikan paroladon.

Lia plena teatraĵaro konsistas nun el 58 verkoj (138 aktoj) kaj kelkaj monologoj kaj dialogoj. En tiu ĉi multprodukta laborado vere mirigas la talenta kreado, la riĉa diverseco kaj genia perfekteco. Li provis ĉiujn teatroverkajn specojn kaj en ĉiuj li triumfis, kiel majstro. Tial oni prave kredas lin la restariganto de la hispana nuntempa teatro.

Li sin montras subtila ironiisto, romantika („La krono Roman“, „La bruta forto“), stilisto („La kreitaj profitoj“), poeto („La fajra drako“, „La princino sen koro“), humoristo („Kruela adiaŭo“), revoluciulo („La malbonfarantoj de la bono“, „Princino Bébé“), satiristo („La edzo de Sinjorino Tellez“, „Personoj konataj“, k. c.), revemulo („La Angora Katino“) kaj ĉiam plej originala kaj konforma al la viva realeco.

La Esperantistoj konas jam kelkajn de mi tradukitajn verkojn el Benavente: „La nesia hejmo“, „Kruela adiaŭo“, „La gefavoratoj“ kaj „Triumfanta animo“. Aliaj jam pretaj baldaŭ aperos: „La malbonfarantoj de la bono“, „La kreitaj profitoj“, „Princino Bebé“, „La Angora Katino“ k. c.

Por tiu ĉi volumo de la „Esperanta Biblioteko Internacia“, mi ne povis elekti — pro manko

de loko — grandan transcendan verkon el la riĉa teatro de Benavente. Mi ĉerpis el ĝi tri verketojn: simplajn, amuzajn, viglajn kaj rapidajn.

„La domo de la feliĉo“ montras trafe, kiel multe trompas en ĉiutaga vivo la homaj ŝajnoj. „La servanto de Don Juan“ prezentas tre lerte disvolvitan aventuron de la fama kavaliro, tiel multe konita en la hispana kaj alilandaj literaturoj kaj fine „La paperujo“ estas ĉarma dialogo, per kiu Benavente malkovras al ni sekreton de la virina enigma koro.

Havu tiuj ĉi verketoj tiel bonan akcepton, kiel bona estis mia intenco ilin tradukante por la amuzo de la esperantistaj legantoj!

Vicente Inglada.

La domo de la felicxo.

Personoj:

Karmen.
Petrino.
Pordistino.
Ludovinjo (de 8 ĝis 10 jaroj).
Frederiko.
Inspektoro.

Ĝendarmoj. Najbaroj.

En Madrido. — Nuna epoko.

SOLA AKTO.

Saloneto de hejmo modesta, sed kun ia bongusto kaj tre zorge purigita. — Fortepiano.

1a Sceno.

Karmen kaj Petrino.

Petrino. Ne faru al mi komplimentojn; se mi malhelpas, forpelu min, kaj se vi havas okupaĵojn tie interne, ni iru kien ajn vi volas, vi ja scias, ke mi restas ĉi tie tiel plezure, ke mi ne povas foriri, kiam mi venis.

Karmen. Vi venas nun tiel malofte . . . Ne volu forrapidi . . . Mi kudris la tutan post-tagmezon; neniam mankas laboro, kaj iom da ripozo estas dezirinda . . . Kaj morgaŭ min atendas la glada tasko; estas sola postulo de mia edzo, ke la ĉemizoj estu kiel spegulo.

Petrino. Ne rediru al mi, oni ne vidas viron pli zorgepuran, ol via edzo. La mia estas pura nur laŭ sezonoj; ofte li havas kvazaŭ manion ŝin ornami kaj trovi en ĉio difektojn, sed alifoje oni devas klopodi ĉiam pri li, por ke li ne iru plej senorde kaj oni ne kredu, ke mi ne zorgas pri lia vesto. Ve, kia viro! Kompreneble, kiam li sin donas al parado, mia korpo tremas, ĉar oni ja scias . . . amintrigo estas preta . . .

Karmen. Sed ĉu li ne korektiĝas? . . .

Petrino. Laŭ sezonoj, kiel ĉiuj . . . Mi diras al li, ke li estas, kiel kato . . . Kaj vidu, se li dibočas for de sia hejmo . . . Dio lin helpu, li ne estas la unua, kaj ni, virinoj, ja scias, kio estas nia sorto, atendi pacience ĝis kiam la manio ĉesas ilin trafi; sed li eĉ ne respektas sian hejmon, kaj eĉ liaj filoj ne povas ignori la aferon, . . . kaj ili jam estas sufiĉe aĝaj . . . mi diras al vi, ke se mi ne gajnas la paradizon, neniu ĝin gajnos.

Karmen. Tio estas ja klopodo . . . Pri tiu ĉi flanko mia Frederiko ne min maltrankviligas.

Petrino. Pri tiu kaj pri ĉiuj . . . Vi ja estas plej bonŝanca edzino . . . Tiu ĉi estas la domo de la feliĉo, kiel mi nomas ĝin . . . Vi du solaj, kun la filineto, nur unu, pri kiu vi devas esti ravegitaj, ĉar plej gracia infanino . . . Plie vi eĉ ne havas servantinon . . . kaj mi laŭdas vian far-manieron.

Karmen. Vidu ja, aliaj amikinoj diras, ke ili ne komprenas mian far-manieron tiom klopodegi, dum mi povus pagi servantinon.

Petrino. Ne daŭrigu . . . pli grava estas tio, kion ili igas al ni fari, ol kion ili faras. Vi estas en paradizo. Sed tri infanoj ne estas same, kiel nur unu, kaj mia edzo kredas, se mi ne havas servantinon, ke tio estas nur pro li, kaj li furiozas, kaj diras ke li perlaboras, por ke mi ne penadu, kaj ke mi igas lin ridinda . . .

Karmen. Ankaŭ Frederiko min riproĉetas pro tio kelkajn fojojn; sed mi scias, ke interne li tre ĝojas, ke ni vivas tiel . . . Kaj por mi, kredu, ne estas promenejoj, nek teatroj, nek amuzoj, tiel agrablaj kiel la hejmaj okupaĵoj . . . Se ni eliras nur ĉiudimanĉe la tri kune, mi jam estas tre kontenta.

Petrino. Mi ja kredas tion. Ĉiam kun via edzo kaj li kun vi . . . En la balkono mi estas ĉiudimanĉe por vidi vin . . . Kian envion mi sentas!

Karmen. Kun via permeso, por ke vi vidu, ke mi traktas vin senkomplimente, mi iras en la kuirejon fari rigardesploron. Frederiko ne malfruos reveni kun la infanino; li iris en la kolegion por ŝin konduki tien ĉi, kiel ĉiuposttagmeze, kaj ni tuj manĝos . . . Unu momenteton.

Petrino. Plej kompreneble. *(Karmen eliras kaj revenas post tre mallonge.)*

Karmen. Ĉu vi rigardas la fortepianon? Estas vero, ke mi forgesis ĝin montri al vi.

Petrino. Mi ankaŭ ne rimarkis. Ĝi estas belega.

Karmen. Ni akiris ĝin pagonte per kelkaj fojoj, alie ne estis eble . . . por la infanino . . . La instruistino diras, ke pro la kapableco, kiun ŝi havas, estus domaĝe, se ŝi ne studus en la Konservatorio, kaj vere. Estas plezuro vidi ŝin ĉe la piano, tiel serioze studantan kaj restudantan . . .; ŝi neniam laciĝas; oni devas ŝin riproĉeti, por ke ŝi ĉesu . . . Kaj vidu ja, ĉar la afero estas nenia malbonaĵo, ne estus prave forpreni de ŝi tian plezuron.

Petrino. Vi faras bone, ĉar vi ja povas. Ĝi estas tre bela klermontro por knabino, kaj se ŝi fariĝos profesorino, jen rimedo por estonteco. Kiu scias, kio povas okazi! *(Oni sonorigas.)*

Karmen. Jen ili venas, la patro kaj la filino . . . Mi kuras.

Petrino. Kuru, kuru . . . Kia feliĉo! *(Karmen eliras.)*

*

2a Sceno.

Petrino, Karmen, Frederiko kaj Ludovinjo.

Ludovinjo. Vidu, vidu, kion ni portas, panjo! . . . Kiel belega! Kion vi deziris . . .

Karmen. Salutu unue, ne estu malĝentila.

Petrino. Venu al mi . . . karega . . . Kisu min. Ĉu vi venas el la kolegio? Kiel vi fartas, Frederiko?

Frederiko. Donja Petrino. Kiel vi fartas? Kaj via edzo?

Petrino. En la kafejo. Ĉiuposttagmeze, elirinte el la oficejo, li tie renkontas la amikojn, kaj kelkajn vesperojn li ne revenas antaŭ la naŭa kaj atendigas nin, nemanĝantajn, kaj la infanojn, kiuj falas pro dormemo . . . Li tie

implikiĝas en babilado, aŭ en la bilardo, aŭ Dio scias . . . Ĉiuj ne estas tiel sanktaj, kiel vi.

Frederiko. Bah! Karaktera afero. La kafejo min enuigas kaj mi ne havas amikojn.

Ludovinjo. Rigardu, panjo, rigardu.

Karmen. Ni do vidu . . . Kiel vi estas senpacienca!

Ludovinjo. Paĉjo ilin aĉetis. Unu por vi, alia por mi. *(Malvolvante paketon kaj montrante du peltajn kolumojn.)* Ili kostis . . .

Frederiko. Silentu, infanino!

Ludovinjo. Paĉjo diras, ke vi tuj malplezuriĝos, se vi scias kiom ili kostis. Estis aliaj pli malkaraj, sed tre malbelaj.

Karmen. Ili estas belegaj . . .

Petrino. Kaj bonkvalita felo. En tiuj ĉi aferoj oni ne povas ŝpari. Kio ŝajnas malkara, rezultas kara.

Karmen. Sed oni ne povas diri al vi ion! Ĉar antaŭ kelkaj tagoj mi diris, ke tio plaĉas al mi . . .

Ludovinjo. Vi permesos al mi, ke mi portu ĝin al la kolegio, por ke la aliaj infaninoj ĝin vidu. Elizabenjo Martinez portas unu preskaŭ senharan. Terenjo Espinosa diras, ke ĝi devenas de kato, kiu mortis en ŝia domo.

Karmen. Infanino, ne diru tion! Estas tre malsaĝe.

Petrino. Kion ili aŭdas!

Frederiko. Ili jam estas knabinoj . . .

Karmen. Kaj ĉu vi dankis paĉjon?

Ludovinjo. Jes, panjo. Kaj mi multe lin kisis. Mi estis bona; la direktorino diris al li, ke mi estas la unua en ĉiuj kursoj.

Karmen. Ĉu vere?

Frederiko. Jes, jes. Sed estas necese, ke ŝi ne malzorgu. Depost la akiro de la fortepiano, ŝi ne volas lerni alian aferon. Tiu ĉi infanino estas tro vigla kaj tiel impresiĝema . . .

Petrino. La aĝo! Sed ne kredu tion, kvankam ŝi estas dome, oni ne rimarkas ŝian ĉeeston.

Ludovinjo. Ĉu vi lasas min ludi la fortepianon, panjo? Mi studos nun iom kaj post la noktomanĝo ankaŭ iom; tiel mi kuŝiĝos pli frue . . . Ĉu vi volas?

Karmen. Jes, nun iom, kaj poste . . . multe kaj ĉiam la samon . . . Nun oni ne povas, ni havas viziton.

Petrino. Pro mi ne, mia kara. Plaĉas ja al mi . . .

Karmen. Ĝi estas, ĉar nun ŝi devas distriĝi aŭ esti kvieta. Ni ne volas, ke ŝi tiel multe fervoriĝu pri la muziko.

Petrino. Vi ĉiam estas tre okupata. Hieraŭ nokte, tre malfrue, antaŭ la dua, mi vidis, ke estas lumo en via ĉambro.

Frederiko. Jes, la laboro ne mankas, dank' al Dio.

Petrino. Pro via lerteco! . . . Iuj amikinoj miaj estis ravitaj pri la literoj, kiujn vi desegnis al mi . . . Mi devis diri, ke tiujn ĉi aferojn vi nur faras pro amikeco, ke vi laboras por multaj gazetoj kaj por komercistoj, kaj vi ne havas tempon, ĉar ili volis mendi al vi, kompreneble, pagante . . .

Frederiko. Ne, ne, tre volonte. En unu senokupa horo, mi desegnos al vi aliajn. Kiuj estas la literoj?

Petrino. Atendu, mi demandos pri tio, ĉar ili estas tri fratinoj: la plej aĝa, edzigita; sed la mastrino de la domo estas la mezaĝa, kaj mi ne scias kiujn literojn ŝi volas surmeti. Nu, vi ja tuj manĝos kaj mi tie ĉi pasigis la tutan posttagmezon.

Frederiko. Vi estas en via domo.

Petrino. Dum nokto, vi ja scias ke mi ne eliras . . . Al Frederiko mi nenion diras, ĉar mi scias, ke li havas laboron, sed kiam vi enuos, venu al mia domo, ni ludos loterion.

Karmen. Mi ja iros . . . Adiaŭ, Petrino. Multajn rememorojn al via edzo, kisojn al la infanoj . . .

Petrino. Adiaŭ, mia bela. Daŭrigu esti tiel bona, tiel diligenta . . . Fartu bone, Frederiko.

Frederiko. Miajn salutojn al ĉiuj. *(Ĉiuj eliras akompanante Petrinon.)*

*

3a Sceno.

Karmen kaj Frederiko.

Karmen. *(Karmen ordigas la seĝojn. Ŝi esploras ĉion per rigardo. Frederiko sidiĝas.)* Ĉu vi sidiĝas? Ĉu vi faros al mi la viziton? Iru, iru al la manĝoĉambro, ĉar tio ĉi difektiĝas.

Frederiko. Lasu, lasu. Ĉu ni, do, ne ĝuos je la plej bona ĉambro de la domo? Sidiĝu ankaŭ, ripozu, vi eble pasigis kudrante la tutan posttagmezon.

Karmen. Nur la komencon . . . Poste venis Petrino.

Frederiko. Por poste babili al vi pri sia edzo.

Karmen. Ŝi estas prava.

Frederiko. Sed ne estas bone, ke ŝi dis-

babilu tion kaj eĉ kelkafoje antaŭ siaj filoj. Kiun respekton ili montros al sia patro?

Karmen. Tio ĉi, jes. Sed ne vin priokupu, ĉar mi ne imitos ŝin. Mi eĉ ne bezonas bondiri pri vi, ĉar ĉiuj parolas al mi tiel favore pri vi. Eble pri mi oni ne parolas al vi same.

Frederiko. Ne, ĉiuj demandas min, kion mi pensis, kiam mi edziĝis kun vi; oni konsilas al mi, ke mi disiĝu de vi.

Karmen. Kiel sprite! Kiam la homoj, nur faras iomete da bono, oni kredas ilin sanktaj.

Frederiko. Nur iomete da bono, ĉu vere? Venu plendoj . . .

Karmen. Pri vi? Dio devus min puni, se mi plendus. Ĉu vi sentas dormodeziron?

Frederiko. Mi estas laca. Hieraŭ nokte mi kuŝiĝis tiel malfrue! . . .

Karmen. Hodiaŭ vi kuŝiĝu frue. Ĉu vi havas laboron?

Frederiko. Hodiaŭ, ne. Sed estas tre bela nokto. Mi volus, ke ni iom eliru por vidi la butikojn, ĉar tio tre plaĉas al vi, kaj aĉeti kelkajn aĵojn, ĉar tio plaĉas al vi ankoraŭ pli.

Karmen. Ne, ni ne faru elspezojn. Oni devas pensi pri ŝparado; mi ne diras ĝin por mi, por nia filineto.

Frederiko. Ni ja havas multe da mono . .

Karmen. Ĉu vi jam vidis tiun sinjoron, kiun vi devis vidi?

Frederiko. Jes, morgaŭ oni pagos al mi, tre bone . . . La proksiman someron ni povos iri al apudmara urbo, via dezirego, por ke la infanino sin banu.

Karmen. Bone, tion, jes. Kio ajn ĝi estu, por la sano de nia filino.

*

4a Sceno.

La samaj kaj Ludovinjo.

Ludovinjo *(kiu aŭdis ĉe la pordo la lastajn vortojn).* Ĉu ni, do, iros vidi la maron? Kiel plezure! Kiam, panjo?

Karmen. Adiaŭ, ŝi jam eksciis! Ŝi nin enuigos ĝis tiam.

Frederiko. Jes, la maro, se vi estas tre bona kaj ne rememoras pri ĝi, ĝis kiam ni tien iros.

Ludovinjo. Ĉu estas vero, ke la maro estas la plej granda afero en la mondo, multe pli vasta, ol la mondo?

Frederiko. Jes, tre granda.

Ludovinjo. Kaj multaj ŝipoj estas en la maro . . . Aŭdu, panjo, kaj ĉu ne dronas la

BIBLIOTEKA PODLASKA im. Zofii Kossak-Szczuckiej w Białymstoku Nr ..... FILIA Nr 14

personoj, kiam ili sin banas, ili ja dronas, se ili falas el ŝipo?

Karmen. Atendu, ŝi ne finos demandi!

Ludovinjo. Kaj mi kolektos multajn konkojn, tre belajn, kiel iu infanino el mia kolegio, kiu estis en Alikante la ĵuspasintan jaron.

Karmen. Ĉu vi volas silenti? Ne babiltedu vian patron . . .

Ludovinjo. Lasu min, do, ludi la fortepianon, por la morgaŭa leciono . . . nu, malfermu la fortepianon . . . *(Ludovinjo sidiĝas antaŭ ĝi kaj ekludas.)*

Karmen. Nu, sufiĉe . . . Ĉu vi volas frue noktomanĝi, Frederiko?

Frederiko. Tuj kiam ĝi estos preta.

Karmen. Mi iras aranĝi la tablon . . . Jen estas la cindrujo, ne ĵetu la cindron sur la tapiŝon . . .

Frederiko. Malzorgu pri tio. *(Karmen eliras. Ludovinjo daŭrigas ludante kaj Frederiko restas dormetanta.)*

Ludovinjo. Panjo, panjo . . . Ĉu vi vidas? Eĉ unu fojon mi ne eraris. Ĉu vi dormas, paĉjo?

Frederiko. Ne, mia filino, . . . mi ja aŭskultas . . . ĝi estas tre bela . . . Tre bone, tre bone . . . Ĉu vi min amas multe, filinjo?

Ludovinjo. Multe, multe . . . jen tiel multe . . . tiel grande, kiel la maro, pli grande, ol la mondo.

Frederiko. Donu al mi kison.

Ludovinjo. Lasu min, nun . . . Bone, venu tien ĉi.

Frederiko. *(Leviĝas kaj iras ŝin kisi.)* Ĉu la fortepiano plaĉas al vi?

Ludovinjo. Multe. Iu infanino el la kolegio, mia plej intima amikino, volas veni por ĝin vidi, ĉar ŝia panjo al ŝi aĉetos unu saman. *(Oni sonorigas kaj iom poste aŭdiĝas la voĉo de Karmen, kiu parolas tre ekscitite.)*

Frederiko. Kiu povas esti? Kio ĝi estas? *(Pretiĝas eliri kaj renkontiĝas kun Karmen, kiu eniras tre timigita.)*

*

5a Sceno.

La samaj, Karmen; poste la Inspektoro, Ĝendarmoj, kaj poste Petrino, la Pordistino kaj najbaroj.

Karmen. Frederiko, Frediĉjo mia! . . .

Frederiko. Kio okazas? Kio estas?

Karmen. Forŝteliĝu, . . . forkuru . . . Ĉu vi ne scias?

Ludovinjo. Panjo, panjo! . . .

Frederiko. Kio? . . . *(Aperas la Inspektoro kaj Ĝendarmoj.)* Ha!

Inspektoro. Lasu vin aresti.

Karmen. Frederiko . . . nu, vi! . . . mia filino!

Ludovinjo. Paĉjo . . . paĉjo! . . .

Inspektoro. Pro juĝista ordono.

Frederiko. Ĉu mi! Kial?

Inspektoro. Mi plenumas la ordonon. En la juĝejo vi ekscios. Vi kaj via edzino.

Karmen. Frederiĉjo! Frediĉjo mia!

Inspektoro. Mi esperas, ke vi ne igos min agi perforte, ke ne estos skandalo.

Frederiko. Ne, ne . . . lasu min, Karmen. Nu, mi iras. Unu peton: ĉu mi povos aliri en veturilo, por ke neniu eksciu?

Inspektoro. Jes, sinjoro. Vi, plenumu la ordonon, kolektu paperojn, sigelu la ĉambrojn. Ĉu vi volas transdoni al mi la ŝlosilojn?

Frederiko. Ne . . . Traserĉu, forŝiru serurojn. Mi havas nenion por kaŝi.

Vi jam aŭdas. *(La Ĝendarmoj eliras. Petrino kaj la Pordistino eniras. Kelkaj najbaroj restas ĉe la pordo, ne kuraĝante eniri.)*

Petrino. Donja Karmen . . . don Frederiko! Kio ĝi estas? Mi nun sciiĝas . . . Kio okazas al vi?

Frederiko. Nenio . . . nenio . . . Nur eraro. Vi jam vidas, ni estas trankvilaj.

Karmen. Ve, Petrinjo! Ve, filino . . . mia filinjo!

Ludovinjo. Panjo, panjo . . . Kion volas tiuj viroj?

Frederiko. Silentu, filino mia, silentu . . .

Pordistino. Sed, don Frederiko, donja Karmen . . . Kia konfuzego estas tiu ĉi? Tio estas ja neebla . . . personoj tiel bonaj . . . Ĝi estas ia malbonvolo.

Petrino. Sed kio do okazas?

Inspektoro. Ni iru, gesinjoroj . . . Vi havas tie ĉi nenion por fari.

Karmen. Mia filino . . . mia filino! . . . Mi ne disiĝas de mia filino.

Inspektoro. Sinjorino . . . Se vi havas iun, al kiu lasi ŝin . . . vi eble revenos baldaŭ . . . mi kredas . . .

Karmen. Ne, mia filino, mia filino! . . .

Petrino. Sed ĉu oni volas vin forkonduki ankaŭ? Kia friponaĵo! Tio ĉi ne povas esti. Kaj estas viroj, kiuj vidas ĝin tiel trankvile! Tio ĉi estas skandalo.

Inspektoro. Sinjorino, kion vi scias? Ni iru . . .

Pordistino. *(Kiu parolis kun unu el la*

Ĝendarmoj.) Sed ĉu tio estas ebla? Mi frenezigas . . . Nu, fidu al ŝajnoj! . . .

Frederiko. Ni iru, Karmen, ni rapidu . . . Petrino, zorgu pri mia filino . . . Filino mia! . . .

Karmen. Mia filinjo!

Ludovinjo. Paĉjo, panjo! . . . Kien vi iras? Mi volas iri kun vi, mi ne restas ĉi tie . . .

Inspektoro. Nu . . .

Petrino. Venu kun mi, ne estu maltrankvila . . . ili ja tuj revenos. Ne ploru . . . Ni iru domen, vi vidos . . .

Ludovinjo. Paĉjo, panjo! . . . Mi ne volas, ke ili foriru!

Karmen. Mia Dio! Mia Dio! Kion vi faris, Frederiko, kion vi faris?

Frederiko. Virino, silentu je Dio! . . . Ni iru . . . *(Eliras Karmen, Frederiko, la Inspektoro kaj Ĝendarmoj.)*

Ludovinjo. Mi volas ankaŭ iri, mi volas iri . . .

Petrino. Silentu, infano, silentu . . . Sed ĉu vi scias?

Pordistino. Silentu je Dio! . . . mi estas konfuzita . . . Oni ja diras, ke li estas falsisto.

Ĝendarmo. Jes, sinjorino, jes. Jam de longe ni serĉadis lin. Belegan proceson li havas! La falsado de tiuj bankbiletoj, kiuj nun cirkulas . . .

Petrino. Sed, ĉu estas eble? Mi ne povas ĝin kredi. Mi ja ne konis pli decajn personojn, ol ili.

Pordistino. Nek pli ĝentilajn, nek pli bonajn luantojn; ĉion oni devas diri, sinjorino; nu, mi ja estas kiel en sonĝo.

Petrino. Mi restis . . .

Ĝendarmo. Nu, sinjorino, ni devas sigeli kaj fermi la domon . . . Faru la plezuron . . .

Petrino. Jes, jes . . . Ni iru, Ludovinjo.

Ludovinjo. Paĉjo, panjo! . . . Kien ili iris? Mi volas iri . . .

Petrino. Jen kio malĝojigas, tiu ĉi idino.

Pordistino. Malfeliĉa filineto! Kio estos al ŝi? Se oni pensus pri la idoj, oni farus nenion malbonan.

Petrino. Kiu scias! Ankaŭ pro ili oni faras multajn aferojn.

Ludovinjo. Panjo, panjo! . . .

Petrino. Silentu, mia kara, silentu! Jen vidu, la domo de la feliĉo . . Silentu, mia kara, silentu! . . . — *Kurteno.*

Fino.

La servanto de Don Juan.

UNUAKTA DRAMO.

Personoj:

Dukino Isabela.
Celio.
Don Juan Tenorio.
Leonelo.
Fabio.

En Italujo. — XVa jarcento.

SOLA AKTO.

Parto unua.

Strato. Flanke, la fasado de nobela palaco.

1a sceno.

Fabio kaj **Leonelo.** *(Fabio promenas antaŭ la palaco, kovrita ĝis la okuloj per ruĝa mantelo.)*

Leonelo *(enirante).* Sinjoro! Don Juan!

Fabio. Ĝi ne estas Don Juan.

Leonelo. Fabio!

Fabio. Vi alvenas ĝustatempe. De tiu ĉi mateno mi nenion manĝis . . . Kiel vi tiom malfruis?

Leonelo. Duonon de la urbo mi trakuris alportante kaj elprenante leterojn . . . Sed Don Juan?

Fabio. Ne duonon, sed la tutan urbon li sendube trakuras alportante kaj reportante sian personon. En malbona horo ni komencis lin servi!

Leonelo. Kaj kion vi faras ĉi tie alivestita tiamaniere?

Fabio. Prezenti plej bone, kiel mi povas, Don Juan ekĝemantan antaŭ la kradofenestroj de dukino Isabela.

Leonelo. Nia Don Juan estas freneza de vanteco. Dukino Isabela estas virta sinjorino kaj ne cedos, eĉ se li plej multe obstinos.

Fabio. Li ĵuris forlasi tiun ĉi lokon, nek tage, nek nokte, ĝis kiam ŝi konsentos lin aŭdi . . . kaj jen vi vidas, kiel li plenumas sian ĵuron . . .

Leonelo. Per farso malinda je kavaliro! Tre strange estas, ke la servantoj de la dukino ne vin forpelis el la strato per bastonbatoj.

Fabio. Ili ne malfruos tion fari. Tial mi atendis vin senpacience. Don Juan ordonis, ke tuj post via alveno, vi okupu mian lokon . . . la lian, mi volas diri. Ni iru kaj preterpasu la domangulon, ĉar eble oni observas nin el la palaco, kaj vi prenos la mantelon kaj ceterajn ŝajnigojn, kiuj prezentos vin ĝis la horo de la promesita batado . . . kiel Don Juan mem . . .

Leonelo. Peniga servostato!

Fabio. Peniga kiel la senhaveco! Kia patro, tia filo. *(Ili eliras.)*

*

Parto dua.

Saloneto en la palaco de dukino Isabela.

2a sceno.

La **Dukino** kaj **Celio.**

Celio *(rigardante tra fenestro).* Estas nekredeble, sinjorino! Du tagojn kaj du noktojn jam pasigis tiu kavaliro antaŭ niaj fenestroj!

Dukino. Malsaĝa afekto! Se li ŝuldas al tiaj rimedoj sian delogistan famon, ĝi kredeble estas atingita per virinoj tre facilanimaj. Kaj tiu estas Don Juan, kiu kalkulas unu aman venkon en ĉiu tago de la jaro? Tie en sia lando, en tiu kruelega Hispanujo, de maŭroj,

de judoj kaj fanatikaj kristanoj, de nepura sango ardigita per inferaj tentoj, inter superstiĉaj fervoroj kaj hipokrita severeco, li povos ŝajni timeginda, kiel tenta demono. Ni, italinoj, ne timas la diablon. La princoj de la Roma Eklezio sendas senĉese al ni indulgencojn ritmitajn en mildaj Petrark'ecaj sonetoj.

Celio. Sed konfesu, ke la kavaliro estas obstina . . . kaj forta.

Dukino. Estas necese fini per unu fojo. Mi ne volas esti la primurmuro de la urbo. Sendu al tiu kavaliro la sciigon, ke la pordoj de mia palaco kaj de mia ĉambro estas nebaritaj por li. Tie ĉi mi atendas lin, sola . . . Dukino Isabela ne naskiĝis por enesti, kiel numero, en la listo de Don Juan.

Celio. Sinjorino, atentu . . .

Dukino. Alkonduku ĉi tien Don Juan. Ne malfruu. *(Celio eliras.)*

*

3a sceno.

La **Dukino** kaj poste **Leonelo.** *(La Dukino sidiĝas kaj atendas fiere la eniron de Don Juan.)*

Leonelo. Sinjorino!

Dukino. Kiu? Ĉu ne Don Juan? Ĉu vi ne estas, kiu paŝadis ĉirkaŭ mia palaco?

Leonelo. Jes, mi estas.

Dukino. Du tagojn kaj du noktojn.

Leonelo. Kelkajn horojn de la tago kaj kelkajn de la nokto . . .

Dukino. Ha! Ekstrema moko! Vi estas unu el la senhonoruloj, kiuj akompanas Don Juan?

Leonelo. Mi estas lia servanto, sinjorino. Mi servas lin malvolonte.

Dukino. Vi malbone uzas vian junecon.

Leonelo. Feliĉaj tiuj, kiuj dum vivado povas sekvi la vojon de siaj revoj!

Dukino. Vi ekprenis tre malaltan vojon. Eliru.

Leonelo. Sen skribo de vi por Don Juan?

Dukino. Senhontulo!

Leonelo. Ĉar vi vokis lin . . .

Dukino. Mi vokis lin, por ke la unuan fojon en sia vivo li trovu sin rekte kontraŭ honesta virino, por ke li neniam povu diri, ke tia sinjorino, kiel mi, ne havis alian defendon kontraŭ li, ol eviti lin vidi.

Leonelo. Tiel, kiel mi nun aŭdas vin, mi aŭdis multajn virinojn respondantajn al Don Juan, kaj multaj vetominacis lin, kiel vi, kaj multaj, kiel vi, akceptis lin malŝate . . .

Dukino. Kaj Don Juan ne punkorektiĝas?

Leonelo. Kaj la virinoj ne punkorektiĝas! La morto, la konscienca riproĉo, la ĉagrenego estas teruraj kaj ne povas nin enamigi, sed antaŭ ili iras sendito deloganta, bela, juna . . . la danĝero, eterna enamiganto de virinoj . . . evitu la danĝeron, kredu al mi; ne aŭdu Don Juan.

Dukino. Vi konfuzas min kun la amaso da vulgaraj virinoj. Ne vane vi estas je la servo de tiu bonŝanca kavaliro . . .

Leonelo. Ne vane mi iras kun la animo malĝoja pro tiel multe da animoj de noblaj estaĵoj, kiuj amis Don Juan. Kiom mi ploris por ili! Mia koro rememoras sinsekve la amojn, kiujn mia mastro dispecigis en sia frenezo, kaj en miaj sonĝoj feliĉe finiĝis tiom da amoj de morto kaj ploro . . . Nur unu amo de Don Juan farus la eternan feliĉon de mia vivo! . . . Mia tuta grandega amo ne sufiĉus por konsoli eĉ unu solan el liaj amantinoj! Riĉega trezoro de amo malŝparegita de Don Juan apud mi, malfeliĉa almozulo de amo! . . .

Dukino. Ĉu vi estas poeto? Nur poeto sin alkonformigas vivi, kiel vi, kun la penso kaj la konscienco en malkonsento.

Leonelo. Vi scias pri la poetoj, sinjorino, vi ne scias pri la senhavuloj . . .

Dukino. Mi scias . . . ke mi ne bedaŭras la trompon de Don Juan . . . vin aŭdante . . . Jam estas al mi interese, scii pri via vivo . . . Diru al mi, kio kondukis vin al tia peniga senhaveco . . . Ne estos dangĉre vin aŭskulti' kiel aŭskulti Don Juan . . . kvankam vi estas lia sendito, kaj vi diras, ke la dangĉro estas la sendito de la morto . . . Parolu sentime.

Leonelo. Sinjorino!

*

4a sceno.

La samaj kaj **Don Juan** *(kiu eniras perforte kun glavo elingigita).*

Dukino. Kiel vi alvenas ĝis mi tiamaniere? Kaj miaj servantoj? . . . Hola!

Don Juan. Pardonu. Sed vi komprenos, ke mi ne devas permesi, ke mia servanto min anstataŭu tiel longe . . .

Dukino. Superante vin!

Don Juan. Vi ne povas ankoraŭ ĝin taksi.

Dukino. Ho! Sufiĉe jam! . . . *(Al Leonelo.)* Ĉu vi ne diras, ke la senhaveco kondukis vin al la malinda ofico servadi tiun ĉi viron? Ĉu vi bedaŭras la servantecon? Ĉu vi vidas kiel dum via ĉeesto oni insultas sinjorinon kaj vi estas

bonnaskito? Vi jam estas libera . . . kaj riĉa . . .

Don Juan. Ĉu vi akceptas lin por via servado?

Dukino. Mi volas vin humiligi, kiom mi povos . . . *(Al Leonelo.)* Mia amo estas neebla por Don Juan, mia amo estas via, se vi scias ĝin meriti . . .

Leonelo. Via amo!

Don Juan. Ĝi igas vin samranga, kiel mi. Vi estas nobelo per ĝi . . .

Leonelo. Sinjorino!

Dukino. Eltiru la glavon! Mia amo estas via . . . Batalu sentime. *(Don Juan kaj Leonelo duelas. Leonelo falas mortvundita.)*

Leonelo. Ve al mi!

Dukino. Dio mia!

Don Juan. Nobela sinjorino! Vidu kiom kostas obstini kontraŭ . . .

Dukino. Mortinta! Pro mi . . . Helpon! . . . Lasu min eliri! Mi timas, multe timas . . .

Don Juan. Vi estas kun mi . . .

Dukino. Multaj personoj kolektiĝas antaŭ la fenestroj . . . Mortigo en mia domo!

Don Juan. Ne tremu! Ili pasis, aŭdis bruon kaj haltis . . . Mi prenas sur min eltiri for la kadavron sen tio, ke iu suspektos . . .

Dukino. Ho! Jes, savu mian honoron . . . Se oni scius!

Don Juan. El tie ĉi mi ne eliros, ne lasinte vin trankvila . . .

Dukino. Ho! Mi ne povas vin rigardi . . . vi terurigas min . . . Lasu min eliri!

Don Juan. Ne, tie ĉi, apud mi . . . Mi ankaŭ timas . . . ne vidi vin . . pro vi mi mortigis malfeliĉulon . . . Ne lasu min, aŭ mi eliros el tie ĉi por ĉiam, kio ajn okazos . . . vi klarigos, kiel vi povos, tiun ĉi sang-okazon.

Dukino. Ho, ne lasu min! Sed malapud mi, ne parolu, ne alproksimiĝu al mi . . . *(Ŝi restas en plej granda konfuzo.)*

Don Juan. *(Rigardante ŝin atente. Flanken.)* Ŝi estas mia! Unu pli! . . . *(Rigardante atente la kadavron de Leonelo.)* Kompatinda Leonelo!

La paperujo.

Personoj:
Klara, deknaŭjara.
Henrikino, tridekdujara.

I.

Klara. Mi ja diras al vi, ke li sendube ne malfruos veni. Atendu unu momenton.

Henrikino. Unu momenton . . . Vi ne plendos; kiam mi venis estis la tria horo . . .

Klara. Post du jaroj kaj tiom da okazoj! . . . Ni ankoraŭ ne kvitiĝis . . . Vi ŝuldas al mi multajn vizitojn, pli longajn ol tiu ĉi, kaj multajn konfidenciojn . . . Hodiaŭ estis mia vico.

Henrikino. Kompreneble, ĝi estis via vico. Hodiaŭ vi estas pli riĉa, ol mi . . . Riĉa per iluzioj, per esperoj, per amo . . . Mi estas ruinigita . . . Ve al mi!

Klara. La morto estas kreditoro, kiu ne pardonas. Sed vi fariĝis vidvino . . . ruinigita,

kiel vi diras, tiel juna, ke vi ankoraŭ povas restarigi vian havon.

Henrikino. La entreprenoj min timigas . . . Mi vivos min tenanta al la vidvinrento de malaktiva klaso . . . *(Paŭzo.)* Ĉu vi scias ke via kavaliro tre malfruas kaj mi ne povos lin atendi? . . .

Klara. Li ja malfruas. Kie li povas esti?

Henrikino. Kie li povas esti?

Klara. Kial vi ripetas mian demandon tiamaniere . . . kvazaŭ priokupate, kvazaŭ tio igus vin pripensi?

Henrikino. Ĉar ĝi estis demando . . . kaj neniam oni devas demandi „Kie li povas esti?“ Se vi scius kiom da fojoj mi demandis la saman aferon!

Klara. Kaj mi. Kaj mi demandos ĝin tiom da fojoj! Kiel ĉiu amanta virino. Minuto-post-minuto mi volus ekscii, kie li estas, kion li faras kaj kion li pensas.

Henrikino. Ne volu ekscii . . . En amo, kiel en religio, scio estas proksima de herezeco.

Klara. Bah! Ĉar mi ne povus ekscii ion malbonan pri Karolo! . . .

Henrikino. Ĉu vi konas lin funde?

Klara. Lia koro ne havas sekretojn por mi.

Henrikino. Lia koro! Naiva Klara! Mi ankaŭ kredis, ke la koro de Joĉjo estas tute mia, ke ĝi ne havas sekretojn por mi! . . . Kia frenezo! Ne estas koro ne havanta ian sekreton . . . Ĉu la koro? Eĉ ne tiel supre. Mi ne volas vin timigi; sed, ĉu vi volas fari provon? Vi penu subite kapti la paperujon de via fianĉo; vidu, kia bagatelo, la poŝa paperujo! . . . Kiel malmulte da sekretoj ĝi povas enteni! . . . Nu, kredu al mi; se vi volas esti feliĉa, neniam intencu traesplori la paperujon de la amata viro . . .

Klara. Mi kredis, ke vi estis feliĉa en edzeco.

Henrikino. Mi estis, mi povis esti, se mi ne estus volinta ekscii . . . Ĉar Joĉjo min amis; min tre amis . . . ĉiom, kiom li povis ami . . .; sed la paperujo . . . kredu ĝin, ĉiu viro havas ĉiam kaŝitan pretsekreton.

Klara. Bah! Sekreton . . . kaj li ja estus tiel nesingarda, ke en la paperujo! . . .

Henrikino. Ve! La paperujo de Joĉjo ne estis poŝa, sed granda kajero, kaj mi trovis ĝin post lia morto . . . Kaj tamen li min amis, min tre amis . . .

*

II.

Klara. Henrikino, mia Henrinjo!

Henrikino. Kio okazas al vi, mia kara?

Klara. Ĉio, ĉio finiĝis por mi! Vi prave diris . . . La paperujo . . . mi eĉ ne povis ĝin malfermi; per tuta forto li fortiris ĝin el miaj manoj; li preferis foriri ne atentante miajn larmojn, nek miajn insultojn . . . ĉar mi insultis lin, jes, mi insultis . . . kaj mi lin malamas . . .

Henrikino. Vi ne estas prava. Mi sentis tion saman, kion vi nun sentas . . . Vi almenaŭ ne vidis la materian pruvon de la trompo . . . Estas sekretoj, kiujn oni gardas pli pro delikateco, ol pro trompo . . . Sed estas ĉiam sekretoj . . . Faru skrupulan esploron en via konscienco, vi konstatos, ke vi kliniĝas al pardono. Ĉu vi ne havas ankaŭ iun paperujeton?

Klara. Mi ne . . . Mi ne havas sekretojn por li . . .

Henrikino. En paperujo . . . palpeblaj . . . Kaj en la koro? Atentu; ŝajnas vulgaraĵo tio, kion mi tuj diros al vi . . . La viroj, estas viroj; la virinoj, virinoj . . . Kia malspritaĵo, ĉu ne vere? Nu, el tio devenas, ke ili ne komprenas unu la alian. La animoj havas sekson, kaj ne estas dubo, la animo de la viro kaj la animo de la virino estas tiel malsamaj kiel tero kaj

maro, kiel maro kaj ĉielo; ili povas sin kisi reciproke, kuniĝi, sed ili ne povas unuiĝi. Viroj kaj virinoj devas respekti kaj pardoni unu al la alia la sekreton de la paperujo . . .

Klara. Ne, ne. Mi ne pardonas . . . Mi amis lin el tuta koro. Se estas vero tio, kion vi diras, la vivo estas tre malgaja; mi ne vivos en la mondo, mi iros en monaĥejon . . .

Henrikino. Vi pripensos la aferon. Kaj se vi, ne volanta pardoni vian fianĉon, fordonas vin al Dio . . . imagu nur la paperujon da sekretoj, kiujn Dio devos pardoni al vi por esti via edzo!

Verkaro de Dro L. L. Zamenhof.

		ℳ
Fundamento de Esperanto: Eldono Franca, Angla, Germana, Rusa, Pola,	bindita	1,300
Eldonoj Bohema, Greka, Hispana, Itala, Rumana	ĉiu volumo broŝurita	0,500
Hungara	„	0,550
Aparte estas haveblaj:		
Ekzercaro (kvinlingva)		0,400
Universala Vortaro (kvinlingva)		0,500
Wörterbuch Deutsch-Esperanto . .	bindita	1,250
	broŝurita	1,000
Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch	bindita	0,650
	broŝurita	0,500
Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto, (6a eldono)		1,500
	elegante bindita	2,000
Lingvaj Respondoj, aperintaj en La Revuo .		0,375
La Batalo de l'Vivo de Charles Dickens . .		0,575
	elegante bindita	1,150
Georgo Dandin, komedio en tri aktoj de Molière		0,550
Hamleto, reĝido de Danujo, tragedio de Shakespeare		0,900
Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj de Goethe, el germana lingvo		0,900
Marta, rakonto de E. Orzeszko, el pola lingvo		1,500
La Rabistoj, dramo en kvin aktoj de Schiller		0,900
La Revizoro, komedio en kvin aktoj de N. V. Gogol		0,675
La Virineto de Maro, fabelo de Andersen, kun 6 ilustraĵoj. El Fundamenta Krestomatio .		0,675
Genezo. La Biblio, unua libro el la originalo		0,900
Eliro. La Biblio, dua libro, el la originalo . .		0,900

Esperanto Verlag Möller & Borel
Berlin SW., Lindenstrasse 18/19.

	ℳ
La Predikanto, libro el „La Biblio“	0,375
La Psalmaro, libro el „La Biblio“	1,100
La Sentencoj de Salomono, libro el „La Biblio“	0,675

Kolekto de „La Revuo“.

LITERATURA FAKO.

	ℳ
Angla lingvo sen profesoro, unuakta komedio de Tristan Bernard, tradukita de Gaston Moch	0,500
Aspazio, tragedio en kvin aktoj, de A. Svjentonovski, tradukita de Dro Leono Zamenhof	1,100
Brazilio, parolado de Sro E. Backheuser, ĉe la „Societo de Geografio“ en Paris; kun ilustraĵoj	0,700
Bukedo, artikoloj pri literaturaj kaj beletristikaj demandoj, de Ch. Lambert	0,900
Imenlago, novelo de Theodor Storm, tradukita el la germana lingvo de Alfred Bader . .	0,400
La Faraono, romano de Prus, tradukita de Dro Bein. Tri volumoj . . . . . (po)	0,900
Frenezo, du unuaktaj drametoj de F. Pujulà-Vallès	0,500
La Reĝo de la montoj, de Ed. About, tradukita de G. Moch. Ilustr. de Doré	1,500
La Rompantoj, kvin monologoj kun ilustraĵoj. Originale verkitaj de Frederiko Pujulà y Vallès	0,500
La Tria, Memoraĵoj pri la tria Kongreso, ilustr.	0,700
Laŭroj, kolekto de verkoj premiitaj en la unua literatura konkurso de „La Revuo“ . . .	0,900
Libro de l'Humoraĵo, originale verkita de P. de Lengyel	1,100
Makbeto, dramo en kvin aktoj de Shakespeare, tradukita de Dro H. Lambert	0,900
Misteroj de Amo, du unuaktaj dramoj de Nadina Kolowrat	0,550

Esperanto Verlag Möller & Borel
Berlin SW., Lindenstrasse 18/19.

	Sm
Mistero de doloro, dramo de A. Gual, tradukita de F. Pujulà y Vallès	0,500

Verkoj tute en Esperanto.

	Sm
Aoro, stenografio internacia. Lernolibro por uzo en la lingvoj Esperanto, angla, franca, germana, rusa kaj hispana de Rudolf Sprotte	0,200
Elektitaj Fabeloj de Fratoj Grimm, tradukis el la germana lingvo Dro Kabe	0,750
Esperanta Sintakso, laŭ verkoj de Dro Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj. En Esperanto verkita de Paul Fruictier	0,700
Kiel ni plibeligos la vivon, originale verkita de Saĝulo	0,250
La kormalsanoj, iliaj kaŭzoj kaj kontraŭbatalo. Priskribo populara de Dro O. Burwinkel, esperantigis Dro Kunschert, kuracisto en Wiesbaden	0,500
Lingvaj Respondoj de Dro Zamenhof. (Aperintaj en „La Revuo“)	0,375
Solvo de la problemo de lingvo internacia, de ***, kun germana traduko de Profesoro P. Christaller	0,400
Sub la neĝo, taglibro de juna loĝanto de la Jura montaro de J. J. Porchat, esperantigis J. Borel	0,500
Tri unuaktaj Komedioj: „La malfeliĉuloj“ de A. v. Kotzebue — „Tie ĉi oni parolas esperante“ de T. Williams — „La Renkonto“ de M. Hankel	0,400
Unua Legolibro, gradigitaj legaĵoj kun frazlibro kaj modeloj de leteroj, de Dro Kabe . . .	0,750
Vortaro de Esperanto de Kabe (Dro K. Bein Lukse bindita	1,750

Presejo de Möller & Borel G. m. b. H., Berlin SW., Lindenstr. 18-19.

KSIĄŻNICA im. Łukasza Gołębiowskiego Nr 14

GERMANA ESPERANTISTO

Duonmonata gazeto por la disvastigo de la lingvo Esperanto.

La gazeto aperas en **du alternantaj eldonoj:**

Eldono A, eliranta la **5 an de ĉiu monato,** celas la **propagandon por Esperanto.** Ĝi enhavas tiurilatajn artikolojn en germana kaj esperanta lingvoj kaj kronikojn pri la germana kaj internacia Esperantomovado.

Eldono B, eliranta la **20 an de ĉiu monato,** estas **pure literatura.** Ĝia enhavo konsistas el plimalpli facilaj legaĵoj kiel eble plej bonstilaj, ekzercoj kun apuda germana teksto, por komencantoj kaj progresintoj, bibliografio, konkursoj, praktikaj konsiloj, enigma parto k. t. p.

Jara abonprezo por Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo 4 M (2 Sm.), por ĉiuj aliaj landoj 2.250 Sm.

La abonoj nur komenciĝas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro.

Laŭdezire oni povas **aparte aboni ĉiun el ambaŭ tute sendependaj eldonoj** por la **duono** de la supre montritaj prezoj.

Esperanto Verlag Möller & Borel
BERLIN SW. 68, Lindenstr. 18/19.

Esperanta Biblioteko Internacia

Tiu ĉi biblioteko enhavas facilajn legaĵojn de ĉiulandaj eminentaj esperantistoj. Ĝi tial bonege taŭgas por ekzercado de la lingvo, ĉu dum la grupaj kunvenoj, ĉu per privata legado.

Ĝis nun aperis:

No. 1. Legolibreto, de J. Borel

No. 2. Fabeloj de Andersen, tradukitaj el dana lingvo, de Fr. Skeel-Giörling

No. 3. Bona Sinjorino, novelo de E. Orzeszko, tradukita el pola lingvo de Kabe

No. 4. Rusaj Rakontoj, de Mamin Sibirjak, tradukitaj el rusa lingvo de N. Kabanov

No. 5. Don Kiĥoto en Barcelono, tradukita el hispana lingvo de Fr. Pujulà y Vallès

No. 6. El la Biblio, trad. Dro L. L. Zamenhof

No. 7. El Dramoj (fragmentoj), tradukitaj el germana lingvo, de Dro L. L. Zamenhof

No. 8. El Komedioj (fragmentoj), esperantigitaj de Dro L. L. Zamenhof

No. 9. Praktika Frazaro. Dialogoj de la ĉiutaga vivo, kunmetis J. Borel

No. 10/11 (duobla numero). Japanaj Rakontoj. El japana lingvo kunmetis Ĉif Toŝio

No. 12. Reaperantoj. Familia dramo de Henrik Ibsen (1a akto), trad. el norvega lingvo de O. Bünemann

No. 13. Bulgaraj Rakontoj, el bulgara lingvo tradukis At. D. Atanasov

No. 14/15 (duobla numero). **Amoro kaj Psiĥe,** de Lucius Apulejus el latina lingvo tradukis Emilo Pfeffer

No. 16. Komerca Korespondo, kunmetis J. Borel

No. 17. Konsiloj pri Higieno, tradukis J. Borel

No. 18. La Reĝo de la Ora Rivero, de John Ruskin, el la angla lingvo tradukis Ivy Kellerman, A. M., Ph. Dr.

No. 19. Sinjoro Herkules. Unuakta burleskaĵo de Georg Belly, el germana lingvo tradukis H. Arntz kaj M. Butin

No. 20. La lasta Usonano de J. A. Mitchell, el la angla lingvo tradukis Lehman Wendell

No. 21. Hungaraj Rakontoj de Ferenc Herczeg, el hungara lingvo tradukis A. Panajott

No. 22. Nord-germanaj Rakontoj de Heinrich Bandlow, el platgermana dialekto tradukis Ella Scheerpeltz.

No. 23. Hispanaj Dramoj de Jacinto Benavente, tradukis Vicente Inglada.

(La kolekto estas daŭrigota.)

Prezo po kajero 0,100 Sm (0,20 M)
(duoblaj kajeroj 0,200 Sm).
Serio de 12 volumoj (afrankite) 1,250 Sm (2,50 M)

Espe
Berli **Borel**
8-19

Presejo de

Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku
000678325